

Leterujo kaj vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 121-a radioprelego, 1966.01.26 & 1966.01.29

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond pri la vivo en Esperantujo.

Ni sendis la bultenon *Inter Ni* de Esperanto-Edukistaro de Svislando al sinjoro Richard Schneller en Chur (Svislando), sinjoro Maurice Merger en Troyes (Francio), sinjoro C. M. Cather en Torquay (Britio), sinjoro Manfred Führer en Langenthal (Svislando), sinjoro Giovanni Bissaldi en Bolzano (Italio), al 17 anoj de la Esperanto-grupo Konkordo en Budapeŝto (Hungario) kaj sinjoro Reinhard Hauptenthal en Sulzbach-Saar (Germanio). Tiu aŭdanto deziras ricevi informojn pri la sorto de la leteroj de Zamenhof en la Centro Edmond Privat de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Jen interesa temo por unu el niaj venontaj elsendoj.

La Ĉarton de la Homoj de Jacques Mühlethaler petis sinjoro L. Giloteaux en Wattrelos (Francio), la gazeto *Elan* en Linselles (Francio) kaj sinjoro August Schulte en Herten (Germanio).

Sinjoro Oskar Breddermann en Esslingen (Germanio) substrekas en letero la neceson de kunlaboro inter la esperanta mondo kaj la internaciaj medioj. Li prave diras : « *Ni devas subteni la internaciajn mediojn, ĉar iliaj atingajoj ankaŭ estas la niaj.* »

Sinjoro Gaston Vidal en Aubières (Francio) muntis standon en ekspozicio pri Mielo kaj Floroj en Thiers por montri, kiom da interesaj dokumentoj li povis rikolti dank'al esperanto. Jen taŭga kunlaboro en faka medio.

Fraŭlino C. Hueter en Clermont-Ferrand (Francio) aprobis niajn severajn dirojn pri la ĉasado al la krokodiloj kaj talpoj ofte svarmantaj en Esperantujo.

En la koncerna elsendo mi tiam diris kelkajn vortojn pri la esperantista skirestado en Adelboden. Tiu manifestacio plene sukcesis. Kion mi trovas en ĝi menciinda, tio estas la fakto, ke inter ĝiaj 18 partoprenantoj 7 estis gefiloj de esperantistoj. Tiuj gejunuloj estas lernintaj nian lingvon hejme dum gastigado de eksterlandaj samideanoj kaj ankaŭ dum partopreno en infanaj kongresoj. La apero de tiuj esperantistoj, kiuj lernis nian lingvon sen la helpo de lernolibroj, pruvas la pedagogian valoron de la porgeknabaj renkontiĝoj. En tiuj manifestacioj la infanoj entuziasmiĝas por la idealo kara al siaj gepatroj, kio treege malofte okazas dum la por ili enuaj oficialaj kunvenoj. UEA, SAT kaj iom post iom naciaj societoj dediĉas sian atenton al la kreado de esperanta junularo. Kiel ĉiu pedagogia laboro, tio estas agado, kiu ne tuj sukcesas. Infano kreskas malrapide. Pacienco kaj sindono estas kvalitoj ne tre oftaj inter propagandistoj. Tion mi spertis en Svislando, kiam mi estris la Esperanto-Junularon. Hodiaŭ tion spertas Tazio Carlevaro, medicina studento, kiu dediĉas siajn fortojn al tasko, kiu ĉe ni estas ankoraŭ pli profeta, ol efika.

En februaro okazos semajnfino de tiu Esperanto-Junularo de Svislando en Chasseron, unu el la belaj suproj de la Ĵurasa Montaro. La skiemuloj, kiuj ne loĝas tro malproksime, informiĝu per nia radio por ricevi la programon de tiu renkontiĝo.

La Natur-Amikoj festis la 70-an naskiĝjaron de sia asocio eldonante belegan sesdekpaĝan bildoriĉan grandformatan memorigilon redaktitan en kvin lingvoj : la germana, franca, nederlanda, angla kaj esperanto. Tiu alloga prospekto estas akirenda. Ĝiaj esperantaj tradukoj estas lerte redaktitaj kaj la tekstoj estas interesaj. Niaj gratuloj iras al la Natur-Amikoj, kiuj jam de multaj jaroj ne hezitis uzadi esperanton por siaj internaciaj rilatoj apud la aliaj gravaj eŭropaj lingvoj.

Leterujo kaj vivo en Esperantujo
Claude Gacond, 121-a radioprelego, 1966.01.26 & 1966.01.29

La Svisa Trafikmuzeo en Lucerno, kiu estas la plej moderna kaj plej ampleksa trafikmuzeo en Eŭropo, ĵus eldonis prospekton, kie esperanto estas ankaŭ uzata. Ĝi estas unu el la 12 lingvoj, apud la germana, franca, angla, itala, nederlanda, hispana, portugala, japana, sveda, suomia kaj dana. Jen vera listo de la lingvoj plej parolataj en la turisma vivo en Svislando. Ni gratulas tiun muzeon, kiu ekuzas esperanton por sia propagando kaj volonte sendos al la petantoj tiun prospekton, kiu nur povas instigi al vizito de tiu stranga muzeo situanta en unu el la plej belaj urboj de Svislando.

Ni konstatas, ke iom post iom nia lingvo najbaras kun plej diversaj lingvoj sur ĉiam kreskanta presafaro. Tiu eksolviĝo de la babelismo kondukas al pliigo de la babelismo ! Ĉu ne strange ?

Tamen estas ĝojiga etapo. Mi diras ĝojiga ne nur pensante al la progreso de nia lingvo en novajn mediojn, sed ankaŭ pensante al la ĝenerale aĉa stilo de la naci-lingvaj tradukoj verkataj por la internacia vivo. Mi ne scias, ĉu anglo havas la saman impreson legante tekston, kiu estas verkita en angla lingvo fare de internacia fakularo, kion ni havas legante francan raporton verkitan de nefranclingvanoj, kiuj uzas nian lingvon por siaj internaciaj kontaktoj. Ni ofte ne komprenas, kion tiu teksto volas diri, kaj pro tio dubas pri la intelekta valoro de ĝiaj redaktintoj.

Malgraŭ ĉiuj instru-plibonigoj la traduk-problemo ne solviĝas. La multekostaj tradukmaŝinoj ne povas anstataŭi tradukantojn. Ili nur povas helpi bonegajn kaj lertegajn tradukistojn. Tio jam estas progreso. Sed ne en la atendita direkto. Bela iluzio finiĝas.

Pro tio, kaj ĉefe pro la multekosteco de la traduk-laboro, oni sentas novan simpatian al nia lingvo. La esperantistoj kapablu inteligente respondi al tiu invito al kunlaboro !

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-